

SANO

JARKOLEKTO 1990

NUMERO 1

ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

Cirkulero de medicinistoj, farmacistoj, geflegistoj, ruĝkrucaĵoj kaj de tiuj, kiuj interesiĝas pri medicino

Eldonas: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, medicinista sekcio, Jilská 10, Praha 1 – kvarfoje jare kiel aldono de asocia gazeto Starto
Redaktas: MUDr Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště 718, ĈSSR
Grafika kunlaboranto : Jiří Hanousek, Liberec
Presas: RUCH LIBEREC, ÚVTEI 85 027

KIAMANIERE ABONI NIAN CIRKULERON?

La jarabono estas 10,50 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro. Se vi ne povas aboni ĉe perantoj sube notitaj, skribu al ni. Vi povas mendi ankaŭ asocian gazeton STARTO, ĝian kulturalan almanakon PANORAMO, diversajn niajn librojn, insignojn, glumarkojn kaj aliajn esperantaĵojn. Abonprezo en ĈSSR 24 Kčs, en socialismaj landoj egalvaloro de 36 Kčs.

PERANTOJ:

BULGARIO: Stojĉo CANKOV, p.k. 208, BG-7000 RUSE
ĈSSR: ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO, Jilská 10, 110 00 PRAHA
G D R : Margit Volkmann, Gubenstrasse 19, Zittaŭ, DDR-88
HUNGARIO: D-rino ISTVANE GAJZAGO, Karolyi Mihaly u. 41/B, 1053 BUDAPEST
JAPANIO : Saburo YAMAZOE, 371 Maebashi-shi, Iwagami-Machi 4/8/9 GUNNA-KEN
POLLANDO: Helena Wegrzyn, ul. Barbary i Bogumila 15/6, PL-62-800 KALISZ
SOVETUNIO: N. SIGAJEV, Posadskaja 18-3, SU-450014 UFA
UEA : UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO. Nieuwe Binenweg 179, BJ 3015 ROTTERDAM, NEDERLANDO
USA : BERN WHEEL, BOOKS, 834 WENOAH, Oak park, IL 60304

Enkonduke al la nova jarkolekto de SANO

Ni salutas la novan jarkolekton de nia modesta bulteno. Estus iom enue en ĉiu kvara numero saluti la novan jarkolekton precipe pro prokrasto de la eldonado el teknikaj kaŭzoj. Tgamen mi volas saluti la novan jarkolekton pro bazaj ŝanĝoj, kiuj en nia kaj najbaraj ŝtatoj okazis. Neniu bridos la eldonadon de kiu ajn presaĵo krom financaj kaŭzoj. Tio koncernas ankaŭ nin. Decidos nur malmolaj ekonomiaj kondiĉoj. Se la enhavo de la artikoloj kaj ankaŭ la lingvonivelo altiros la legantojn, kiuj kapablos pagi nian abonkotizon, nia estonteco estos certa. Ni povas demandi, ĉu la politikaj ŝanĝoj povas influi la enhavon de nia bulteno. Kvankam la enhavo estis ĉiam pure faka, ni atendas nun pli grandan letervenon kun kontribuajtoj el liberigitaj landoj.

Ni klopodos alporti kaj raportojn pri teknika kaj ŝienca progreso el evoluantaj landoj, kaj interesaĵojn el aliaj mondpartoj. Kelkaj legantoj-fakuloj povis riproĉi ne sufiĉe sciencan nivelon de raportoj, kiuj ne prezentis progreson sur strikte scienca bazo, karakterizita per konata triopo: eksperimento - pruvo - konkludo. Tamen ni ne forgesu, ke nia bazo de legantoj konsistas ne nur el sicencistoj. Niaj legantoj estas ankaŭ mezedukitaj medicinistoj, farmaciistoj, bestkuracistoj, legantoj, kiuj simple deziras disvastigi sian edukitecon pri popularsciencaj novaĵoj. Multaj ankaŭ volas havi minimuman konon de medicinaj novaĵoj por pritrakto de siaj sacecaj malfacilaĵoj. Ankaŭ por tiaj devas esti nia bulteno kleriga. Ni ne povas sekretigi, ke la bazo de niaj legantoj estas pli aĝa, kaj ilia intereso pri medicinaj problemoj havas intiman karakteron. Tamen ni restu opitismuloj. Ni ĉiuj klopodu fari nian bultenon pli legebla, lingve pli simpla, digestebla, komprenebla. Ĝia legado estu kaj distra kaj informa.

La redaktoro

INFORMOJ

El la mondo: Granda Britanio: Spitegrandan kreskon de la trafika frekvenco, malleviĝis en Granda Britanio nombro da evarioj kun mortaj sekvoj dum la lastaj jaroj je 25 procentoj, laŭ la raporto de la ministerio de trafiko. Oni supozas, ke tu fakto estas kaŭzata precipe pro la nacia kampanjo kontraŭ la alkoholismo.

Svisujo: Laŭ la studo de la svisa asekura socio kreskos la nombro de la loĝantaro de la GTERO komence de la tria miljaro al ok miliardoj. Konservigis la tendenco de la "maljuiniĝo" de la loĝantaro: La nombro da homoj super 64 jaroj el 9,2 al 10,5 procentoj. Mezaĝo de la TERO en la jaro 2000 estos 26,4 jaroj (en la jaro 1880 temis pri 22,4jj). La plej junan populacion havos Afriko per mezaĝo de 17,3 jaroj; en Nordameriko tio estos 35,7. En Eŭropo 37,2. La nombro da Eŭropanoj el la tuteca nombro de la loĝantaro malleviĝos al 8 procentoj (nun 11 procentoj), en sudorienta Azio ĝi leviĝos kontraŭe al 35% (hodiaŭ 29%). Ĉirkaŭ 45 procentoj da homoj okupiĝos per salajrita aktiveco.

Usono: Fluso da narkotaĵoj, kiu inundis Usonon, provokas kreskantan maltrankvilon de usonanoj. Atestas pri tio rezultoj de esploroj de la publika opinio, kiun efektivigis televida asocio ABC. 86 procentoj de demanditoj signis narkotaĵojn la ĉefa problemo, kun kiu batalas ilia lando. Se tiu nombro estas kredebla, tiam tiu "blanka morto" maltrankviligas usonanojn pli ol neagrable defcito de la ŝtata buĝeto, senlaboreco, epidemio de ajdeso, furorado de krimuloj kaj minaco de la atoma milito. La enketo ebligas ankaŭ taksi grandecon de la narkomanio en la lando. Pli ol triono da demanditoj havas amikojn, kiuj ĝuas tiun malbenon. Ĉiu kvina sciigis, ke narkomanio estiĝis kaŭzo de malharmonio en iliaj familioj. Egalajn rezultojn alportis ankaŭ la esploro de la Instituto de Gallup por la semajngazeto Newsweek. Laŭ ĝiaj asertoj pliparto da usonanoj deziras senrespektajn dispoziciojn por malebligo de disvastigo de narkotaĵoj en la lando.

Belgio: Eksperimentojn kun psikotropa medikamento hidroksizin-o faris sanitara servo de belga armeo. En la oficiala raporto de la ministerio de nacia defendo oni asertas, ke la armeo jam 30 jarojn uzas tiun medikamenton por venki la senton de timo aŭ de profunda maltrankvilo. La citita studo konkludis, ke la medikamento povas esti uzata ne kiel dopingo, sed kiel kuracfilo altiganta psikan ekvilibron ĉe homoj, kiuj troviĝas en stresa situaĵo.

Liberio: En tiu ĉi lando, same kiel en multaj aliaj afrikaj ŝtatoj ĝis nun ne esti venkitaj supersticoj el estinteco, ke kelkaj korpomantoj regas per mirakla povo. Multaj liberianoj, precipe loĝantoj de la vilaĝoj, ne dubas, ke la okulo, koro kaj pluaj organoj de la homo alporas sanon, sukceson, feliĉon. Ĉiujare la polico registras kelkajn murdojn, kies celo estis havigi unuopajn homorganojn.

Granda Britanio: Pli ol miliono da ĝiaj civitanoj uzas akvon kun alta nivelo de plumbo, du milionoj uzas akvofontojn venenigitajn per aluminio, en vico de landregionoj enhavas la trinkakvo altigitan koncentritecon de nitritoj kaj pesticidoj. Dekono da subaj akvoj en Britanio, notas la gazeto "Observer magazine", estas kontaĝitaj per substancoj provokantaj kancerajn malsanojn.

Francio: Kelkaj afrikaj kreskaĵoj stimulas produkton de lakto kaj estas uzataj de afrikaj junaj patrinoj en formo de teo. Tiu tradicio estas antikva kaj pri ĝia praveco volis pruviĝi L. Sawodogo kaj L. M. Haŭdebine el la laboratorio de fiziologio de laktado el la Nacia instituto por agronomia esploro. La rataj inoj estis nutrataj per ekstraktoj de tiuj kreskaĵoj. Jam post kvar tagoj ili konstatie kreskon de produktado de kasieno - baza materio por produkto de la lakto. La esploristoj daŭrigas kun eksperimentoj faritaj kun dombestoj.

Brazilio: Grupo da esploristoj el "Universidade F. Federal de Vicosa" evoluigis novan specon de hidrolizita lakto, kiu enhavas ĉiujn komponentojn de la bovina lakto kaj oni elbas ĝin apliki eĉ al homoj, kiuj estas kontraŭ la normala lakto alergiaz. La universitato intencas ĝian produkton industriigi, por ke estu la tutas bezono certigata por la tuta ŝtato.

Malajzio: Ĝis nun ne ekzistis antikoagulo, kiu efikus sufiĉe rapide, havus neniamajn kromefikojn kaj kiujn oni povus apliki ĉe akutaj cerbaj okazintejoj. Tiu ĉi medikamento estis trovita kaj ĝi estas el malajzia vipuro. Ĝi esdtis jam klinike trovita. Kaj kia rezulto? Surpriza: La paciento revenas al la elira stato trifoje pli rapide.

Hispanio: En la hospitalo de la urbo Mérida dum operacio de artefarita ĉesigo de la gravedeco en la kvina gravedmonato. Naskiĝis knabino pezanta nurajn 400 gr, kiu surprize komencis post momento memstare spiri. Laŭ la agenturo EFE temas pri la dua kazo en la mondo kun tiel malgranda korpopezo.

Japanio: La lasta el multaj malgrasigaj medikamentoj estas ĉi-foje la semo de salato. Tamen ne estas necese ilin manĝi, kiel rekomendas iu tokia kuracisto; sufiĉas surglui ilin sur certajn lokojn de aŭriklo per leŭkoplasto. Seĉ venas la sento demalsato, sufiĉas al la paciento premi tiujn lokojn kaj la sento de la malsato tuj malaperas.

Usono: La plej granda produktanto de medikamentoj estas la firmao "Johnson an Johnson" en New Brunswick, New Jersey (Usono) kun spezo de 6 124 miliardoj da dolaroj jare.

REFERAĴOJ

Spertoj pri kortransplantoj (Artzliche Praxis,41,36,1234,1989)

Ek de la unua kortransplanto antaŭ pli ol 21 jaroj efektivigis pli ol 10 000 da tiaj. La plej grava samtempa problemo en tiu ĉi ĥirurgia fako estas la diagnozo de la disiga reakcio de la transplantita organo kiu devas esti frutempa. Tial oni supozas, ke estas inde ĉe ĉiu paciento efektivigi minimume unufoje jare la koran katetizon. Bonaj efikoj de la lastaj jaroj bazas sur multaj partaj spertoj: severiĝis la elekto kaj de la transplantitoj kaj de transplantatoj, pli bone kaj pli frue estas diagnozita la menciita disiga reakcio, intensiviĝis la postoperacia priflego de la paciento kaj nelaste pli ofte aplikiĝas la imunosupresiva terapio individue adaptita por ĉiu paciento. Precipe tiu fakto kaŭzis, ke la transviva tempo de la jaro povis altiĝi de 64% el la jaro 1980 al preskaŭ 90% en la jaro 1989. Oni povas diri, ke tiu sukceso datriĝas ek de la terapia enkonduko de Cyklosporino en la klinikan uzadon. La plej ofta morta komplikaĵo krom la menciita disiga reakcio estas apero de infekto. Ĉe siagnozo de la disiga reakcio estis ĝin unu plej uzata biopiso de la kormuskolo, kiu tamen estas por la malsanulo granda ŝarĝo. Ĉar la deisiga reakcio kaŭzas mallrĝigon ĝis fermon de korkronaj arterioj, montriĝas en tiaj kazoj indikita esploro per kora katetrizo. Daŭra sennerviĝo de la kormuskolo kaŭzas la fakton, ke la pacientoj eĉ en la kazoj de progresintaj formoj de la korkronaj arterioj sentas nenian angionozan doloron.

Primara ĥoriokarcinomo de hepato (Chirurgische Praxis,40,1,25-34,1989)

Tiu ĉi tumoru konata ankaŭ sub nomoj ĥrioepiteliomo aŭ maligna trofoblasta teraromo estas hodiaŭ enkulata kinter trofoblastaj neoplasmoj kun alta grado de maligneco. Ĥriokarcinomoj havas grandan tendencon al erozioj de angioj kaj penetro en ilian lumenon, kaŭzantaj grandajn hemoragiojn kaj nekrozojn. En la literaturo estis publikigita jam vico daraportoj pri apero de t.n. ekstergenitalaj primaraj ĥrioblastomoj (karcinomoj), kiuj oni ne povas certece signi kiel metastazojn de la primara tumoru de la genitala lokiĝo. Tial oni povas legi pri primaraj ĥriokarcinomoj de pulmo, mediastino, uzinveziko, gastrointestina trakto ktp. La tumoru trafas precipe genitalon de virinoj kaj ofte ligiĝas al patologia gravedeco. La menciitaj ekstergenitalaj formoj estas malpli oftaj. Tamen en tiu ĉi kazoj troviĝas neniu fakto, kiu atestus pri primara trafo de la genitala areo. Oni pli frue dubis pri tiaj ekstergenitalaj lokiĝoj. Tamen hodiaŭ oni certe sicas, ke tiu ĉi tumoru povas veni ekstergenitale eĉ ĉe ambaŭ seksoj. La diagnozon oni povas prui histologie kaj per pruvo de forte pozitiva reakcio beta-HCG. Citiĝas kazuistiko de virino, kiu havis pruvitan primaran ĥriokarcinomoj de la hepato ka j pulmo kaj kie en eltranĉita utero kaj pli malfrue ĉe sekcio estis trovitaj nenij signoj de iu tumoruza trafo de genitalaj organoj.

Nefropatioj el analgetikoj (Chirurgische praxis,37,4:764,1987)

EnGFR estiĝas proksimume 10% renaj nesufiĉecoj, kiuj bezonas dializon aŭ transplanton surbaze de abuzo de analgetikoj. Spertoj el Aŭstralio montras, ke post substituo de fenacetino per paracetamolo en analgetikaj miksaĵoj en okazis malaltiĝo de apero de tiaj malsanoj. Nur kiam en la jaroj 1979-1980 estis ĉiuj kombinitaj analgetikoj ligitaj al kuracista preskribo, okazis proksimume post 5 monata periodo signifa malaltiĝo de nefropatioj surbaze de uzo de analgetikoj. En GFR kvankam okazis malgrandiĝo de konsumo de fenacetino por persono kaj jaro de 3,4 al 1,4g/jaro, sed la incidenco de nefropatioj ne malaltiĝis. Samtempe altiĝis konsumo de Paracetamolo de 2,2 al 4,5 jaro, tiel ke konsumo de ambaŭ substancoj restis la sama. Risko, kiu partoprenas en estiĝo de nefropatioj estas prepariĝoj kun partoj psikotropaj kaj kombinaĵoj kun barbituratoj, kiu ofte kaŭzas dependecon al ili. Nefrologia socio de GFR postulas sekve de tio kune kun fakuloj pri farmakologio limigon de eblo de vendado de monokomponentaj analgetikoj por maksimume 20 tablojdoj. Plue ĝi postulas ilin vendi nur kontraŭ preskribo ĉe ĉiuj analgetikoj kaj sedativoj kaj malpermeson de propagando de uzado de medikamentoj kontraŭ kapdoloroj.

Indikoj kaj kontraŭindikoj de kortransplantoj (Schweizerische medizinische Wochenschrift 118,14:522-524,1988)

Indikoj: 1) Grava maldekstraflanka aŭ ambaŭflanka korkamera malsufiĉeco kun malboniĝanta korstato spite intensivan maksimuman medikamentan terapion 2) Invalidiga kormalsano, dum kiu ne plu eblas klasika korĥirurgia interveno 3) Gravaj malignaj disturboj de kora ritmo, kiuj ne estas reguleblaj eĉ per maksimuma medikamenta aŭ ĥirurgia kuracado.

Kontraŭindikoj: 1) Gravaj eksterkoraj malsanoj 2) Grava kora kaĥeksio kun signoj de rena aŭ hepata malfunkcio 3) Mankanta kunlaboro de paciento 4) Altiĝinta periferia pulmovaza rezisto 5) Aĝo trans 60 jaroj. Ju pli aĝa estas la paciento, des pli grava devus esti taksataj eĉ aliaj kontraŭindikoj, karakterizataj ĉe individuoj de pli granda aĝo per polimorbideco.

La plej matura tempo por agi. Dro Lukaĉ Sukenik

En la evoluiĝantaj landoj mortas jare pli ol duonmiliono da patrinoj pro komplikoj de gravedeco aŭ dumnaske. Pliparton da tiuj mortoj oni povus eviti. En la industriaj teritorioj kontraŭe mortas proksimume 6 mil patrinoj pro la cititaj komplikaĵoj.

Dum la monda kongreso pri ginekologio kaj akuŝahelpo estintjare en Rio de Janeiro esti atentigita pri la fakto, ke estas la plej natura tempo por kontraŭagi la sensencan mortadon. Ne estas do eble, ke la akuŝistoj okupiĝu pri fekundigo "in vitro" kaj elspezu por tiu celo grandajn monsumojn, dum la aktualaj problemoj de akuŝologio kaj ginekologio restas ĉe la rando de ilia intereso. La kaŭzoj de la morteco en la evoluiĝantaj landoj estas la samaj kiel antaŭ 80 jaroj en la civiliza modno: komplikoj de akuŝo, graveda hipertensio, postparta sepsio, komplikoj post abortoj. Krom tio estas problemoj de diabeto, malario, malsanoj de la cirkulado de sango, kiuj dum gravedeco baze malboniĝas. Estas necesa baza pliboniĝo de la tuteca sanitara sistemo, priflego de la gravedulinoj, stablo de konsultejoj por virinoj en la evoluiĝantaj landoj, ĉar pli parto da gravedulinoj naskas hejme sen kuraficista helpo kaj helpas nur sperta akuŝistino, eĉ la virinoj naskas senhelpe.

Por osta kresko (Laŭ Svobodné slovo, 89-11-18)

Preskaŭ mirakle sonas la informo de la gazetarja raportistoj, kiuj vizitis la plej malnovan okcidenteŭropan universitaton en Tübingen/Tibingen, pri la nova pulvora substanco, kiu subtenas kreskon de la ostoj. Profesoro Karl Heinz Schmidt sukcesis izoli el homaj ostoj substancon, kiu efikas preskaŭ mirakle: Ĝi fiksiĝas en osta medolo kaj aktivigas osteoplastan sistemon, subtenanta la kreon de la nova osta histo. Albumeno nomita Osteopoetin-o prezentas post mulzjaraj eksperimentoj kun bestoj signifan progreson en tiu ĉi medicina problemaro. Helpe de tiu ĉi substanco oni eblos "krei" substituajn homajn organojn per korpaj produktaĵoj. La sicencistoj dum la lastaj jaroj izolis la kreskajn faktorojn por ruĝa kaj blanka sango, eĉ por nervaj ĉeloj kaj danke al gena inĝenierado ili nun estas fabrikataj en laboratoriaj kondiĉoj. La novaĵo sukcese pruviĝis

dum kuracado de 12 pacientoj en al universitata kliniko kaj tiamaniere malfermiĝas al la fakuloj la novaj ebloj de kuracado. Laŭdire helpe de tiu ĉi substanco oni povos realigi en estinteco ĝis nun nespertitajn kuracprocedojn - ekzemple la kuracistoj lasos alkreski la mankantan osteopecon dum kraniaj traŭmoj, ostaj tumoroj aŭ kistoj. Oni povos ĉiujn "truojn en ostoj" plenigi. Interesa estas ankaŭ alia eblo - per tiu ĉi metodo oni povos "ankri" dentajn protezojn en gingivoj. Oni supozas, ke post 5 jaroj tiu ĉi nova substanco povus aperi en pli vasta praktikado.

Trairo de akuŝo ĉe tre junaj kaj pli maljunaj gravedulinoj (Zeitschrift fur Geburtshilfe und Perinatologie, 191,2:60-63,1987)

Studo el la jaroj 1975-1984 montris, ke la akuŝo de juna naskantinoj sub 16 jaroj di sia aĝo kaj trans 42 jaroj trairis kun pli granda kvanto da komplikajtoj. Pli maljunaj virinoj krom jam ĉeestataj riskoj kaj kun maljunaĝo ligitaj faktoroj havis pli grandan nombron de prolongitaj akuŝoj, kio montriĝis per pli granda nombro a cezaraj operacioj aŭ alia aktiva dumnaska helpo. Feta morteco ĉe ambaŭ grupoj estis proksimume la sama. Dum la studo estis observita kaj trairo de gravedeco kaj propra akuŝo kaj trairo de maljuna 46, primiparoj prezentis ne tutajn 13% de la tuta kompilaĵo de la naskantinoj. La plej ofta akuŝa komplikaĵo ĉe pli maljunaj naskantinoj estis trombozo - preskaŭ ĉe 7% de kazoj.

Sensangaj operacioj de galvezikaj ŝtonoj (ĥolelitiazo)

Komence ni citu kelkajn faktojn: Ŝtonetoj de galveziko trafas en evoluiĝintaj landoj proksimume 10% da loĝantaro. Proksimume la kvarono de tiuj pacientoj postulas kuracistan priflegon dum unu jaro, 2% estas operaciitaj. La kuracado estis dum kelkaj lastaj jardekoj suverena agadteritorio de ĥirurgio. Dum ŝtonetoj en la veziko estas objekto de pritakso de la kuracisto, la ŝtonetoj en galduktoj ĉiukaze devus esti radikale forigitaj. Kontraŭ la galŝtonoj oni povas ĥirurgie interveni en 90%. La propra operacio estas praktike sen komplikaĵoj. Dum forigo en galduktoj ĉiam pli ĉefrolas la endoskopiaj metodoj. Tio signifas, ke trans stomako kaj duodeno estas enkondukita tubusa aparato de la vidsenco la ŝtoneto estas elprenita. En la gazeto "Aktuelle Chirurgie" el la jaro 1988 oni fereras pri malsanuloj pro galdukta ŝtoneto, kiu estis alimaniere forigita per lasero. En tiu ĉi referaĵo estas asertata, ke tiamaniere oni povas forigi 90% da ĉiuj ŝtonetoj. Nur la tre malmolaj aŭ en la muroj de la galduktoj fiksitaj ŝtonetoj bezonis ĥirurgian revizion. Lasero frakasas ŝtonetojn grandajn ĝis 4,7x3 cm.

Diference de la urinŝtono la kuracado de galvezikaj ŝtonoj per ultrasona frap-ondo ĝis nun ne transpaŝis la kadron de la klinika gajnado de spertoj. Uzo de lizotripsio per frapondo estas kunigita kun vĝico da kondiĉoj, ekz. ne devas temi pri pli granda nombro unu ne devas esti pli granda ol 1 cm, la galveziko devas havi plenan funkcion ktp.

Solvado de galŝtonoj - t.n. lito-lizo - komencis sian eraon en la jaro 1972 per malkovro de la efikado de acido ĥenodesoksiĥola sur ŝtonetoj. Por kuracado per tiu ĉi metodo indas galŝtonoj, kiuj ne estas calciigitaj, de diametro ĝis 1,5 cm. Aplikado de la medikamento estas longdaŭra kaj la efiko de la dujara kuracado varias (laŭ diversaj sciigoj) inter 15-65% laŭ la elekto de la pacientoj, dozado kaj kombino de medikamentoj. Malavantaĝa estas longdaŭra aplikado, nefidindeco kaj multekosto, neparolante pri la apudaj efikoj de la kuracado.

Fine la lasta metodo provita en la mondo estas rekte solvado de la ŝtonoj en la galveziko. Enpike tra la hepato aŭ en loka anestezio helpe de ultrasona sondilo estas enkondukita malgranda katetro rekte en la galvezikon. La katetro estas ligita al komputila pumpeto, kiu enpelas en la galvezikon rapidan fluon de ĥemia solvilo, kia estas ekzemple metil-terciar-butil-etero. La ŝtonetoj sinsekve solviĝas kaj fine per la katetropumpeto estas forŝitaj restaĵoj kaj de la solvilo kaj de ŝtonetoj, kiuj povas kaŭzi recidivon.

Naturaj kuraciloj en medicino

Tia estas la nomo de la simpozio, kiu okazis junio en Prago kaj tiu ligiĝis al la monda konferenco de klinika farmakologio en Heidelberg kaj Mannheim en FGR. Partoprenis en ĝi ĉirkaŭ 350 fakuloj el la tuta mondo.

La scienca programo konsistis el du kompletoj. Ĝi prezentis unue eŭropan alpaŝon al la terapio helepe de la naturaj medikamentoj kaj plue japanan tradicion medicinon "Kampo", Moderna fitoterapio, kiel pri ĝi parolis dum la gazetkonferenco prof. MUDr J. Elis DrSc kaj pluaj fakuloj, ne signifas eluzojn iamaj scioj surbaze de la tradicio. Temas pri strikte scienca alpaŝo, dum kiu estas uzataj puraj efikaj materioj el kreskaĵoj same kiel la preparaĵoj sintetikaj. Ne temas nur pri la tradiciaj kuracaj teoj. Drogaj estas prilaboritaj en tinkturojn, ekstraktojn, sed ankaŭ en injektojn kaj aliajn formojn.

La prelego koncentriĝis precipe al plantaj kuraciloj uzataj en kuracado de astmaj malsanoj, alergioj, malsanoj de hepatoj, renoj ktp. Prof. S. Nakagami el Japonio inter alie emfazis, ke dum la lastaj 13 jaroj travivas en lia lando la naturkuracado grandan renesancon. Ankaŭ en Ĉeĥoslovakio en elektitaj klinikoj estas provataj du japanaj medikamentoj; unu efikas kontraŭ hipertensio, la dua efikas kontraŭ alergioj. Tiu laŭ rezultoj de la provoj, povus efiki dum kuracado de la infanoj. Ankaŭ en Ĉeĥoslovakio havas la fitoterapio sian longan tradicion.

Virinoj kaj la fumado /JAMA,261,1583,1989)

Diversaj multaj sicencaj raportaĵoj ŝjnas atesti pri la fakto, ke kaj la aktiva kaj la pasiva fumado altigas riskon de malsaniĝo pro karcinomo de la utera konuso. Ĉe 234 virinoj kun karcinomo de tiu lokiĝo efektiviĝis suma esploro. Ĉe 36 el ili temis pri invalida formo de la tumor. Kontrolan grupon faris 480 sanaj virinoj, el kiuj 75% ne fumis. Montriĝis, ke aktivaj fumantinoj havis 3,4 foje pli altan riskon de la malsaniĝo pro karcinomo de utera konuso. Ĉe virinoj eksponitaj dum 5 lastaj jaroj almenaŭ 3 horojn tage al la enspirado de la cigareda fumo estis tiu risko altigita 2,9 foje. Kiel aparte malutila montriĝis pasiva fumado en fermitaj ĉambroj, kie la risko de la menciita karcinomo altiĝis jam post 1,5 horoj.

Statoj de la postoperacia konfuzo (Chirurgische Praxis,40,2,339,1989)

Ĉiu operacio kaj ĉiu narkozo kaŭzas transitivan ŝanĝon de hemodinamiko kaj metabolismo de la centra nerva sistemo. La paciento disponiĝas ĉi rilate per vico da kompensaj mekanismoj, tiel ke eĉ gravaj operacioj povas trairi sen gravaj psikaj disturboj. Tamen se spite okazas tiaj statoj, oni devas serĉi la eblajn patogenetikajn faktorojn. Spertiĝas, ke al la plej oftaj provokaj momentoj apartenas: alta aĝo de la operaciita paciento, lia malbona tuteca stato kaj korpa kaj psika, cerbaj malsaniĝoj, kiuj antaŭ la operacio estis plene kompensitaj kaj ne estis pro tio diagnozitaj kaj nediagnozeblaj, longjara uzado de trankviligiloj, analgetikoj aŭ alkoholo, ĉe junaj unuopuloj ankaŭ de amfetamino, kokaino aŭ halucinogenoj. Plue propra kuracado de "pruvitaj medikamentoj" por forigo de la timo antaŭ la operacio, primitivigitaj doloroj aŭ disturboj de dormo, elreligo de elektrolita aŭ glukozaj metabolismo resp. akvomastromado, aliaj jam pli frue ĉeestantaj internaj malsaniĝoj, precipe malsanoj de hepato kaj renoj, difektoj de kora ritmo, gravaj infektaj malsanoj, endogenaj difektoj de la metabolismo ktp. La stato de konfuzeco povas manifestiĝi eĉ post kelkaj medikamentoj kvankam ili povas esti post la operacio indikitaj: digitalisaj medikamentoj, antibiotikoj, antiparkinsonikoj, citostatikoj kaj similaj.

Tromboliza terapio en praktiko (Annals of Int. Medicine 997-962,1989)

Spertiĝis, ke nur ĉe proksimume 15% da pacientoj kun akuta infarkto de kormuskolo sekvas tromboliza terapio, dum kio proksimume al 8 malsanuloj kun infarkta okazaĵo apartenas 1 aŭ 2 homoj, kiuj estas tiel kuracataj surbaze de false pozitivaj infarktj diagnozoj. Estas citata la studo el la jaroj 1983 ĝis 1985, kiu prezentas kompilaĵon de 7734 personoj kun spontane manifestanta prekoria doloro aŭ doloro de la maldekstra duono de la brustkorbo. Surbaze de ekg kaj enzimaj kriterioj estis ĉe 1118 (14%) pacientoj konfirmita diagnozo de infarkto de kormuskolo. Tamen nur 261 (23%) el ili plenumis kriteriojn por enzima terapio tromboliza: la aĝo sub 75 jaroj, alveno en

hospitalon maksimume 4 horojn post apero de la kordoloroj kaj ekg kun versimila korinfarkto. Interese estas, ke ĉi tiujn kriteriojn plenumis ankaŭ 60 (1%) el la malsanuloj, ĉe kiuj tamen la korinfarkto ne estis pruvita. La nombro de la malsanuloj, konvenaj por la tromboliza terapio estis plue reduktita per kontraŭindikaĵoj tiel, ke fakte uzis ĉi tiun terapion nuraj 15% da malsanuloj.

Prognozo de la stomaka karcinomo (Chirurgische Praxis, 215-220, 1989)

Kvankam apero de karcinomo de tiu lokiĝo montras tutmonde malleviĝon restas karcinomo de la stomako la dua plej ofta kaŭzo de morto kondiĉata de maligna tumora malsano. La tempo de transvivo de 5 jaroj dum la lasta tempo tute ne ŝanĝiĝis kaj faras en la landoj de la okcidenta Eŭropo kaj Usono 15%. Pli bonajn tiurilatajn spertoj faris medicinistoj en Japanio. estas citata ilia studo el la jaroj 1974 ĝi 1987 enhaviganta kompilaĵon de 403 tiaj malsanuloj, kiuj estis operaciitaj. Montriĝis, ke la aĝo de la trafituloj kaj lokiĝo de la tumoro havis nenian prognozan signifon; decida faktoro estis ekkono de la tumora stadio dum senpera postoperacia tempo. Kompare rezultoj el pli fruaj tempoj okulfrape kreskas la nombro de operaciitoj el pli frua tempo kaj stadio de la malsano. Tio ebligas plilongigi la tempon de la transvivo postoperacia. Tiuj spertoj atestas pri tio, ke decida faktoro por la prognozo de la stomaka karcinomo estas ĝis frutempa diagnozo, pri kiu ni devas maksimume strebi.

Citostatika kuracado de tumoroj (Arztliche Praxis, 41, 21, 641, 1989)

Eĉ inter kuracistoj oni povas aŭdi la opinion, de post ĥemoterapio de malignaj malsanoj ni povas atendi nur plilongigon de la vivo. Tamen ne la elsanigon de la tumoro. Tamen faktoj montras, ke nura citostatika aplikado ĉe plenkreskuloj kapablas ĉe 12% da malsanuloj atingi plenan likvidon de la tumoro. Ĉe unuopuloj ĝis 40 jara estas ĉi tiu proceta dato ankoraŭ signife pli alta. Ĉi tiuj rezultoj temas pri akuta leŭkemio, progresintaj stadioj de limfogranulomo, neĥodĥkinaj limfomoj kaj ĥoriokarcinomo. Eĉ ĉe malgrandĉela formo de bronkogeno karcinomo, kiu estas ligata kun precipe malbona prognozo, oni povas helpe de ataka ĥemoterapio atingi en duono de la kazoj kompletan remiton; ĉe 15% da pacientoj oni povas atingi samtempe kvinjaran transvivon. Ĉar tiu terapio estas ligata kun gravaj kaj de la paciento malfacile tolerataj kromefikoj, oni ne povas miri, ke ofte estas konsiderata malaltigo de la dozoj de unuopaj citostatikoj. Tia procedo ne estas solvo kaj kompromisoj tiaj ne estas rajtigataj, ĉar montriĝis, ke redukto de la citostatikaj dozoj je 20 ĝis 30% kaŭzas mallevigon ĝis duono de la nombro da tumoraj remitoj.

Kuracado de la obstrukca pulma malsano (Deutsche Apotheker Zeitung, 129, 25, 1334, 1988)

tiu ĉi malsano estas ofte rekonata tro malfrue. Ĉe la komenco de la kuracado ofte eraradas la kuracistoj, ke la bronkodilatiloj estas aplikataj nur prookaze kaj ne en formo de daŭra kuracado. Beta-2-simpatomimetikiloj estas medikamentoj kun granda potenco. Antiĥolinergiloj montras la plej grandan terapian uzeblecon, teofilino kontraŭ la malplej grandan kaj krom tio ankoraŭ nedisponeblas tiu ĉi farmako en spreja formo. Al la pli daŭra efiko povas gvidi nur dum longa tempo aplikataj beta-2-simpatomimetikoj. Kvankam frekvenco de ilia apliko komune tre varias, oni povas diri, ke kutime validas: Ju pli la malsano estas grava, des pli mallonge daŭras la kuraca efiko de ĉi tiu farmako. Por uzado de kortikosteriodoj ĉe obstrukca malsano de la pulmo kontraŭ ĉiuj teoriaj imagoj montriĝis, ke ili efikas des pli bone, ju pli egalas ilia nivelo. Por rego de la klinika bildo de la malsano oni bezonas baze altigi la matenaj dozoj de la medikamentoj.

Virinoj kaj la ajdeso (Arztliche Praxis, 41, 46, 1736-1737, 1989)

En GFR oni konstatis, ke la nombro da novaj malsaniĝoj per ajdeso restas dum lastaj tri duonjaroj konstanta. Tio gvidas al opinio de kelkaj fakuloj, ke "ajdeso malrapide estiĝas la normala malsano". Tamen montriĝas, ke la nombro da infektigitaj virinoj daŭre kreskas. En GFR prezentas la nombro da virinoj eble 15% de ĉiuj enfektigitaj. Estas inter ili tiaj, kiuj ne apartenas al iu riska grupo ĝis nun konata. Eĉ se tiu ĉi malsano malrapide ĉesas esti la nura vira afero, tamen ĉe virinoj ne kreskas la nombro tiel okulfrape; ĝi estas karakterizata per certaj diferencoj, kiuj meritas atenton. Antaŭ ĉio okulfrape estas la fakto, ke la trafitaj virinoj estas tre junaj, meznombro de 10 jaroj pli malaĝaj ol

la viroj. Tiu fakto havas sian anatomian kaj fiziologian klarigon. Ĉe HIV-pozitivaj virinoj pli ofte venas sekundaraj amenoreoj, persistemaj vaginaj infektoj, displazioj de la konuso kaj cistaj ŝanĝoj de ovario. Plua problemo ĉe la infektitaj virinoj estas la ebleco de gravediĝo. La fakuloj pri tiu problemo pliparte havas al tiu problemo negativan starpunkton, ĉar en 30 ĝis 50% de kazoj okazas traĭro de la infekto de la patrino al la infano. Virinoj laŭ vidpunkto de ajdeso kontraŭ la viroj malavantaĝas, ĉar por ili ne ekzistas iu aktiva ŝrimilo preventa. Precipe fatgala estas la situacio de narkomanulinoj, ĉe kiuj oni ne povas separi preventon de la droga dependeco e la prevento de ajdeso.

Kapdoloroj ĉe virinoj (JAMA,261,15,2211-2216,1989)

En Usono efektiviĝis ampleksa studo, kiu realiziĝis surbaze de telefonaj interparoloj. Montriĝis, ke kapdoloroj okazas pli ofte ĉe kanbinoj kaj junaj virinoj ol ĉe similaj aĝgrupoj de viroj. Krome la kapdoloroj ĉe virinoj estas eĉ pli intensivaj kaj pli longdaŭraj. La inoj estis komence demanditaj, ĉu ili sentis dum la lastaj 4 semajnoj kapdoloron. Poste estis farita taksado de la doloro laŭ certaj kriterioj kaj ili estis demanditaj, ĉu ili pro kapdoloro serĉis konsilon de la kuracistoj dum la tempo de malfgacilaĵoj, aŭ ĉu ili devis ĉesi laboron. Montriĝis, ke pli ol 82% de viroj kaj 72% de virinoj ankoraŭ neniam pro la kapdoloro vizitis la kuracistojn. ĉe virinoj, kiuj spertis kuracistan esploron kreskis kun la aĝo nombro da uzitaj kontraŭdoloraj medikamentoj. La nombro da pacientoj kun medikamentoj, kiuj estis gajnataj kontraŭ recepto, estis ĉe ambaŭ seksoj komparebla, ĉe libere atingeblaj medikamentoj prevalis okulvide la inoj.

Nova antihistiminiko sur horizonto (Deŭtsche Apotheker Zeitung,129,25,1334,1989)

Ĉiuj ĝisnunaj antihistaminikoj malavantaĝas pro tio, ke ili estas akompanataj per malagrabra sedativa efiko. Nova reprezentanto de tiu ĉi grupo Loradino (lisino) tamen ĉi tiun efikon malhavas. Lisino blokas kun granda selektiveco efikojn, kiuj estas perataj trans H-1-receptoroj. Surbaze de longdaŭra efiko de ĉi tĝiu nova substanco sufiĉas sola taga dozo de 10 mg. Ĝisnunaj spertoj atestas pri tio, ke farmakokinetikaj ecoj de ĉi tiu nova farmako ne estas ĉe unuopuloj de maljunaj aĝgrupoj iamaniere malfortigitaj. Ne estas bezonate antaŭtimi la sedativan efikon, ĉar la medikamento havas nenian rilaton al cerbaj receptoroj de histamino. La medikamento ankaŭ neniel priinfluas vetukapblon de ŝoforoj. Lisino havas ankaŭ pozitivan efikon ĉe pacientoj kun urtiko ĥronika, tamen la terapio ĉe tiaj malsanuloj daŭras ĉirkaŭ 4 semajnojn.

Sportado ĉe korpulmaj malsanoj (Artzliche Praxis,41,32,1072,1989)

Celkonscia korpa trejnado ĉe tiaj pacientoj en la aĝo de 55 ĝis 70 jaroj kaŭzas korpulman "juniĝon". Ĉirilataj studadoj montris, ke 14taga trejna programo efikas ĉe tiuj malsanuloj tiam korpulman kapaciton, ke ĝi egalas al de 20 jaroj pli junaj netrejnitaj personoj. El la vidpunkto de sportado montriĝis la plej konvena longdistanca kurado. Nome ĉe tiu sporta apeco temas pri sola korpa aktiveco, kiu samtempe ne kaŭzas leviĝon de diastola sangopremo kaj relative malalta estas plikresko de sistolaj valoroj. tute malaj rezultoj montriĝas post jam dektaga enlitiĝo, kiu mallevigas korpulman kapaciton je 10 aŭ 20%. Krome tiu senaktiveco kaŭzas nedeziratan kreskon de kateĥolamina produktado.

H U M U R A Ĵ O J

Post foriro de la kuracisto asertas la sinjorino jam en atendejo:

"Nu, vidu. Mi havas hipohondrion. Kaj vi ĉiam diradis, ke mankas al mi nenio."

"Kiel fartas sinjoro edzo?" demandas najbarinoj de sinjorino K.

"Bone. Sed el la hospitalo li certe ne revenos baldaŭ"

"Kaj tion diris al vi lia doktoro?"

"Tute ne. Sed mi vidis lian flegistinon."

La ŝoforo de la sanitara aŭtomobilo sinjoro Jones obeeme donadis al sia patrino ĉiam la tutan salajron. Ŝi ĉiam donis al li unu dolaron, se li brave kondukis. Foje venis Jones hejmen kun brilanta vizaĝo: "Mary, mi gajnis en la loterio 500 000 dolarojn!"
La edzino severe demandis: "Jones, mi demandas vin, kie vi prenis tiujn kvin dolarojn por la loto?"

Ĉeský esperantský svaz
110 00 PRAHA 1, Jilská 10

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6.4.1979